

Nicolau Dols¹

Alprenplano de malpli uzata lingvo en multlingva socio


Resumo

Ĉi tiu prelego traktas pri la alprenplano de minorigita lingvo en multlingva socio. Mi prezentas la kazon de la Kataluna en la Balearaj Insuloj. 160 lingvoj estas nuntempe parolataj en ĉi tiuj insuloj, kie kaj la Kataluna kaj la Hispana estas oficialaj lingvoj. Kiel fari la Katalunan lerninda de la envenintaj laboristoj kaj kiel atesti iliajn lingvonivelojn estas gravaj aferoj ne nur por la publika instrusistemo, sed ankaŭ por la tuta baleara socio. Mi montras la nunan situacion per statistiko pri lingvopovo kaj per analizo de la leĝsistemo pri lingvoinstruado kaj uzado. Mi specife pritraktas : a) la trejnado de jam laborantaj instruistoj kiuj studis for la Kataluna Landaro aŭ antaŭ la nuna lingvoreguloj, b) la strategiojn por integri en la lernejo la enmigrantajn alilingvanajn studentojn , c) la aliformon de la malnova lingvotestado en la nova sistemo kadre de la eŭropa testsistemo, kaj d) la lingvopolitiko en universitata instruado kaj scienca komunikado.


La Baleara insularo apartenas al la teritorio de la Kataluna lingvo ekde la dektria jarcento. Ekde tiam ĝis la duono de la dudeka jarcento, la plejparto de la loĝantaro estis unulingvana en la Kataluna. Vere, ekde la dekoka jarcento la Hispana estas oficiala lingvo. Ĉi tiu oficialeco ne tute afektis la ĉiutagajn aferojn pli malpli ĝis la unuaj amasalvenoj de migrantaj laboristoj pro la disvastigado de la turisma ekonomio post 1960. Ĉi tiuj laboristoj elvenis ĉefe el la unulingvaj regionoj de Hispanio, kaj trovis en la Balearaj neniun oficialan kialon ŝanĝigi ilian lingvon ĉar la Kataluna estis forviŝita el la formala edukado dum la diktaturo, kiu ne finiĝis antaŭ la apero de la nuna Hispana konstitucio (1978), post la morto de la diktatoro (1975). Ekde 1983 la Baleara insularo, kiel aŭtonoma regiono, posedas regionan konstitucion, kiu deklaras kaj la Katalunan kaj la Hispanan oficialaj lingvoj. Kvankam la kono de la Kataluna ne estas oficiale deklarita kiel deviga (malsame tio kio okazas kun la Hispana, deklarita en la Hispana konstitucio kiel deviga lingvo por ĉiuj hispanoj), neniuj povas fini sian bazan edukadon sen atingi plenan posedon de ambaŭ lingvoj. Laŭleĝe la estraro de la regiono devas garanti la konon kaj la oficialan uzadon de ambaŭ lingvoj. Ĉi tie staras la baza problemo kiu mi deziras analizi en ĉi tiu prelego: studado de la kataluna estas deviga en la Baleara insularo kaj ankaŭ en Katalunio kaj en Valencio, sed ne en la ceteraj partoj de Hispanio. Kiel ricevi, do, kaj integri en la socio kaj ankaŭ en la edukosistemo ne nur alvenantajn lernantojn el aliaj regionoj, sed ankaŭ alvenantajn instruistojn kies trejnado kaŝis la lingvan diversecon de Hispanio? Jen la ĉefa problemo de la subteno de lingvo kiu dividas teritorion kun unu el la plej parolataj lingvoj. Ĝis la komenco de la nuna jarcento ĉi tiu problemo ŝajnis nur la tipa skemo de malsameco inter submetita lingvo kaj leĝe altrudita lingvo. Nun alia grava faktoro de lingvorilatoj estas la evoluo de socio kiel multlingva socio, kaj la danĝero de sociaj rilatoj funkciantaj nur per la lernado de la surmetita lingvo, la Hispana. Estas grave nun kompreni la strukturon de la loĝantaro en la insularo kaj precipe ilian lingvan scipovon kaj iliajn originojn. La lingvoj kiujn la loĝantaro agnoskas kiel siaj propraj estas la sekvantaj (oficiala enketo el 2010)²:

¹ Nicolau Dols Salas, Professor Titular d'Universitat, Departament de Filologia Catalana i Lingüística General, Universitat de les Illes Balears, n.dols@uib.cat

² Fonto: Institut Balear d'Estadística (<http://www.ibestat.cat>).



Diversaj konkludoj elstaras ĉi tie: (1) historie estas la unua fojo kiam la plejparto de la loĝantaro manifestas ke la hispana estas sia propra lingvo, kaj ĉi tio okazas dudekkvin jaroj post la sankcio de la leĝo por la normigado de la Kataluna en la Baleara insularo; (2) nun 6,19% el la loĝantaro deklaras sin dulingvuloj; (3) pli ol dek elcentoj konsideras sin parolanto de unuan lingvon malsaman ol ambaŭ la Kataluna kaj la Hispana.



(Scipovon en la Kataluna, elcentoj).

Ne ekzistas oficialaj datumoj pri la scipovon en la Hispana.

La elveno de la loĝantoj de Baleara insularo ebligas la komprenon de ĉi tiuj kvantoj. Ekde 2001 la elcento de fremduloj loĝantaj en la insularo kreskis el la 8,4% ĝis la 21,9% (2010, Ibestat).

	Loĝan taro	Fremdul oj	Elcento de fremduloj
2001	878627	73883	8,40
2002	916968	99744	10,87
2003	947361	126505	13,35
2004	955045	131423	13,76
2005	983131	156270	15,89
2006	1001062	167751	16,75
2007	1030650	190170	18,45
2008	1072844	223036	20,78
2009	1095426	237562	21,68
2010	1106049	242256	21,90

Ĉi tiuj loĝantoj kune kun tiuj hispanaj naskiĝitaj

en aliaj regionoj atingis 46,51% el la tuta loĝantaro. Certe, kelkaj el ĉi tiuj loĝantoj el hispana elveno kreskis en Katalunio aŭ Valencio (3,13% kaj 1,65% el la tuta loĝantaro), do la Kataluna ne estas stranga al ili. Eble la evoluo de fremda enmigrantaro povus ekvilibrigi la enmigradon de hispanoj en la insularo, precipe pri scipovon: malkonantaj ambaŭ lingvojn, la decido por unu aŭ la alia povus esti pri libera. Malsame, la Hispanoj ne sentas la devo lerni novan lingvon pro tio ke ilia jam estas oficiala en ilia nova regiono. Tamen, la situacio estas pli komplikata ol ĉi tio: nuntempe, grava parto de fremduloj envenintaj en la insularo elvenas el landoj kie la Hispana estas oficiala lingvo, do ili sentas la saman malbezoon ol la Hispanoj pri la lernado de novan lingvon. La loĝantoj en B. I. elvenintaj el Centr-Ameriko aŭ Sudameriko³ kune kun tiuj el Ekvatora Gvineo estis 89.960 en 2010, kaj tio valoras 37,13% el fremduloj kaj 8,13% el la tuta loĝantaro de B. I.


La datumoj estas multe pli altaj ol la datumoj pri la fremdaj loĝantoj en Katalunio en la jaro 1996 uzataj de Hall 2001. Tamen, la konkludoj de Hall ŝajnas ankaŭ bonaj por la Baleara Insularo.⁴

Verŝajne, ĉiuj kiuj lernas la Katalunan unue lernas la Hispanan. Ĉi tiel la lernado de la Kataluna aperas al novloĝanto kiel io senutile aldonita al liaj efertoj adaptiĝi al nova socio. Ĉi

³ escepte el tiuj landoj kie la Hispana ne estas oficiala: Sankta Vincento kaj la Grenadinoj, Jamajko, Surinamo, Gujano, Sankta Lucio, Trinidado kaj Tobago, Belizo kaj Brazilo (nur citataj ŝtatoj el kie alvenas enmigrintoj al B. I. ekde 2001 ĝis 2010).

⁴ «The many new residents from Latin America, however, are swelling the already large Spanish-speaking community, and those of other origins are understably keen to learn, not Catalan, but Spanish, the language which is the basic requirement for interaction with the central government immigration authorities and with potential employers both inside and outside Catalonia» (38).

tiuj cirkumstancoj defias bazan regulon de kunvivo inter katalunparolantoj kaj hispanparolantoj: la tiel nomigita “pasiva dulingveco” aŭ “pasiva multlingveco” (koncepto kun longa historio ambaŭ en la Kataluna kaj en Esperanto⁵, kaj konsistanta en la ebleco de dialogoj per pli ol unu lingvo, kie ĉiu parolanto uzas sian lingvon kaj komprenas la alian).



Do, la normigado de la Kataluna kiel socia lingvo estas grava defio kiu devas superforti la leĝan kaj socian malekvilibron kaj iĝi alloga al homoj kiuj pro ĉi tiu malekvilibro ofte ne bezonas lerni ĝin. La rolo de la Hispana kiel intermetita lingvo kondamnas la Katalunan iĝi satelita lingvo, en la senso de “satelita kulturo” laŭ Eliot (1948), unu nocio jam uzata de Aracil (1983) en la defino de “intermetita lingvo” kiel socilingvistika koncepto.

Estas grave koni la lingva origino de la envenintoj. Ĉi tiu afero ne estas tute facila, ĉar ne ekzistas oficialaj enketoj pri lingvaj elvenoj. Tamen, Linguamon – Casa de les llengües, kiu estas potenca fundacio pri mondlingvoj, kune kun la Universitat de les Illes Balears, esploris tiun ĉi punkton lasta jaro. Ne estas kompleta enketo, sed ŝajnas bona indikaĵo pri la lingva komplekseco de la insularo. Enmigrintoj el ĉiuj naciecoj ĉeestante en la insularo estis enketitaj, proporcie al la kvanto de homoj envenintaj kaj ankaŭ ne forgesante la kvanton da lingvoj en ĉiu migrosendanta lando.⁶ Finfine, 1.100 enketoj bezonatis. Homoj el ambaŭ seksoj kaj el ĉiuj aĝoj, edukado kaj loĝdaŭro en ilia nova lando estas enketitaj. Pli ol 150 lingvoj aperis. La datumo estas grava ĉar estas la unua fojo kiam oni rigardas la socilingvan panoramon de la insularo pli for ol la kutima rilato inter la du oficialaj lingvoj. Krom ĉi tiuj du oficialaj lingvoj ekzistas nuntempe en la Baleara insularo dudek kvin lingvoj kun pli ol 1.000 parolantoj (kiel ilia unua lingvo):

⁵ Dalmau (1936=2010).

⁶ 1 enketo po centoj (aŭ ĝis centoj) da enmigrintoj el ĉiu sendanta lando (maksimume 15 enketoj) + unu po ĉiu aldonata lingvo parolata en ĉiu lando kun pli ol 100.000 parolantoj en ĝia teritorio + unu po dek aldonataj lingvoj parolataj en ilia teritorio de pli ol 10.000 homoj (ĝis 100.000 parolantoj).

PAROLANTOJ	LINGVO
> 20.000	Germana, Angla, Araba
> 10.000, <20.000	Franca, Galega, Rumana
> 5.000, <10.000	Itala, Bulgara, Amaziga, Portugala
> 1.000, <5.000	Pola, Nederlanda, Rusa, Volofa, Mandarena, Kiĉua, Sveda, Gvarania, Ukraina, Vua, Igba, Tagala, Bambara, Pangaba, Slovaka

Krom la Kataluna kaj la Hispana, sesdek sep lingvoj estas la ĉiutagaj komunikiloj inter gepatroj kaj gefiloj, do, depende de la grandeco de la lingva aro, sesdek naŭ lingvoj eblas daŭrigi kiel denaskaj en la baleara socio. Kiel agi kun ĉi tia diverseco? Eblas daŭrigi ĝin, subteni ĝin? Ne traktas pri perforta altrudo de oficialaj lingvoj; traktas ekzemple pri lingvoj en la lernejo aŭ pri lingva regado de rilato inter registaro kaj civitanoj. Rajtas ĉiu lingva aro demandi ke sia lingvo lerneblas en lernejo? Aŭ interrilati kun registaro per sia lingvo? Ideale eble jes, kaj ju pli lingvojn oni povus lerni kaj praktiki, des pli bone, sendube. Helpi disvastigi konojn pri diverseco de lingvoj kaj kulturoj estas mem bona celo de lernejo kaj ankaŭ de la tuta socio. Tamen, la bona agado de ĉi tiu laŭdebla celo estas tute malfacila. La lingva komplekseco de niaj hodiaŭaj socioj obligas per multe la lingva diverseco de Bjalistoko dum la infanaĝo de la iniciatinto de nia lingvo.

La Baleara Komitato pri Edukado jam pritraktis la problemon en sia raporto pri la kurso 2008-2009. Tiu ĉi raporto esprimas la zorgon de la komitato pri la daŭro de la edukado en la Kataluna post la bazlernejo. Pri ĉi tiu aspekto, ili elstarigas la fakton ke la nuna leĝo pri edukado en la insularo devigas ĉiujn lernejojn instrui en la kataluna almenaŭ la duono da fakoj/horoj. Estas akcepteble instrui plu en tiu ĉi lingvo, sed ne estas akcepteble instrui pli ol duono da fakoj/horoj en la hispana. Ĉi tiu leĝo estis sankciita dum la kurso 1997-1998 kiam la kvanto de fremdaj lernantoj estis 2.956, kaj ĉi tiu cifero kreskis ĝis 24.963 dum unu jardeko. Pro tio la komitato demandas “leĝon kiu pligrandigus la ĉeeston kaj uzadon de la Kataluna en lernejoj [...]. La nuna leĝo ne garantas la sufiĉan posedon de la Kataluna al la fino de la de la deviga instruperiodo”⁷. La komitato rekomendas ke daŭriĝu la rimedoj je akcepti kaj helpi envenantajn lernantojn. La regiona ministrejo pri kulturo kaj edukado eldonis en 2002 ordonon pri akceptado de malfrue envenantaj lernantoj al la Baleara edukosistemo. Ŝajnas grave legi la motivaron de la ordono por kompreni la tutan problemon:

“La diverseco de ĉi tiuj lernantoj estas granda kaj dependas de tre malsamaj elementoj: loko de elveno, kialo por migri, socioekonomiaj faktoroj, lingvaj kaj kulturaj faktoroj... Ĉi tiuj

⁷ “una nova legislació que augmenti la presència i l’ús del català en els centres educatius. Amb la normativa actual no es pot garantir que l’alumnat escolaritzat en els centres de les Illes Balears acabi l’escolarització obligatòria amb un coneixement suficient de la llengua catalana” (220).

ĉirĉumstancoj kaŭzas gravan kompleksecon al lernejoj kaj al la instruistaro. Kunvivas en lernejo lernantoj ĵus enirintaj la insulan eduksistemon –aŭ jam enirintaj antaŭ mallonga tempo– sen konoj pri la Kataluna aŭ la Hispana, kun hispanparolantaj lernantoj sen konoj pri la Kataluna, elvenintaj el aliaj Hispanaj regionoj aŭ el aliaj landoj. Tamen la situacio estas eĉ pli malfacila ĉar al la lingvaj faktoj aldoniĝas aliaj aferoj: ekzistas gravaj kulturaj diferencoj inter lernantoj el kulture proksimaj landoj kaj lernantoj elvenintaj el pli malproksimaj landoj el la Baleara kultura vidpunkto. Estas ankaŭ rimarkinda la akademia diferencoj (lernantoj kun malmulta lernesporto, malregulaj akademiaj dosieroj, kune kun lernantoj kiuj jam spertis eduksistemon simila al nia)”.

La ordono koheras kun la doktrino kiu ĉiam aplikiĝis en la pritrakto de lingvoj en la Baleara eduksistemo: oni ne rajtas dividi la lernantojn en grupojn laŭ ilia lingvo. Ĝis nun, oni ne rajtas elekti ĉu oni volas ricevi instruadon aŭ en la Kataluna aŭ en la Hispana. Simile, neniu lernejo rajtas dividi fremdajn studentojn de lokaj studentoj. Tamen, oni eblas instrui kromajn lingvajn lecionojn kaj specifajn helpajn seancojn al ĵus envenintoj dum horaro kiu iras el ses ĝis dek ses horoj semajne, sed la referencgrupo devas esti konservata. Dividi studentojn laŭ ilia lingva elveno povus signifi la kreon de sociaj apartaj grupoj, kaj ĉi tio ŝajnas danĝera en forte diversa socio kiel la Baleara. Aliflanke, la leĝa teksto atentigas pri la gravecon de la situacion de la Kataluna kaj rekomendas prioritati ĉi tiun lingvon en la speciala agado por helpi novajn studentojn adaptigi al ilia nova etoso:

“oni ne devas forgesi la socilingvan situacion de Baleara Insularo –la malekvilibro de la socia uzado de la Kataluna–, kaj tio, ke tre ofte la loko de la plej signifa kontakto inter ĉi tiuj studentoj kaj la oficiala lingvo propra de la Balearaj estas la klasĉambro. Pro tio bezonatas [...] prioritigi ĉi tiun lingvon en la planoj de lingva adaptigado”.

La raporto pri la kurso 2008-2009 de la Baleara Komitato pri Edukado jam demandis pli da rimedoj por subteni ĉi tiun programon. Ĉi tio montras ke la obligo de la enmigrintoj en la Balearaj Insulo estas prava defio por la eduksistemo.

La normigado de la Kataluna ne estas limigita al eduksistemo, sed ankaŭ atingas la laborajn rilatojn. Estas deviga ke ĉiuj oficialaj instancoj en la insularo rilatu en la Kataluna kun la civitanoj⁸ se ili deziras ĝin, kaj mem ke la komercejo kun pli ol tri laboristoj ankaŭ faru same⁹. Pro tiuj laboraj kialoj, la lernado de la Kataluna aperas kiel grava al envenintoj. La regiona registaro planas kursaron kun malmultekostaj kursoprezoj. Ĉi tiu jaro (2011) jam adaptigita la ekzamensistemo de la scipovo pri la Kataluna al la Eŭropa Referenckadro, la kvanto de aliĝintoj al ekzamenoj atingis 3.005 homojn, el kiuj 2.335 estas Hispanaj kaj 398 estas elvenintaj el dek ses aliaj landoj kiuj havas la Hispanan kiel oficiala lingvo.¹⁰

Alia grava agadkampo estas la trejnado de instruistoj kiuj studis antaŭ la eldono de la leĝo de lingva normigo aŭ studis for de la teritorioj kie la Kataluna oficialas. Diplomo pri Kapablo Instrui la Katalunan kaj per la Kataluna en Infanlernado kaj Bazlernado aŭ la Diplomo pri Kapablo Instrui per la Kataluna en Mezlernado bezonatas eniri la eduksistemon kiel instruisto ekde 1986. Novaj instruistoj kiuj studis en universitatoj de Balearaj Insuloj, Katalunio aŭ Valencilando post 1992 jam ricevis sufiĉe da trejnado dum iliaj studtempo en universitato. La studplano por Infanlernejaj kaj Bazlernejaj Instruistoj konsistas en la sekvantaj fakoj:

⁸ Dekreto 114/2008, 17 Oktubro (pri postenoj en la regiona administracio), Leĝo 5/2003, 4 Aprilo (pri la normigo de la Kataluna en la sanitaria sistemo).

⁹ Leĝo 11/2001, 15 Junio.

¹⁰ Fonto: Direcció General de Política Lingüística. Govern de les Illes Balears.

Fako	Horoj
Lingvo I (post prui bazan scipovon de la Kataluna; alie kroma fako de 6oh)	60
Lingvo II	60
Socio kaj Naturo de la Balearaj Insuloj	15
Metodoj por la instruo de la Kataluna	15
TOTALO	150 / 210

Kaj mezlernejaj instruistoj devigas studi la sekvantan studplanon:

Fako	Horoj
Lingvo I (post prui bazan scipovon de la Kataluna; alie kroma fako de 6oh)	60
Lingvo II	60
Seminario pri faka esprimo	15
Seminario pri lingvoj en mezlernado	15
TOTALO	150 / 210

Dum la jaro 2009-2010, 2.109 homoj aliĝis la kursojn. La evoluo de la aliĝintaro estas la sekvanta¹¹:

01-02	02-03	03-04	04-05	05-06	06-07	07-08	08-09	09-10
2.833	2.886	3.337	3.206	2.845	2.563	3.324	3.566	2.109

La kosto de ĉi tiu sistemo estas grandega. Entute, lasta jaro ĝi atingis 321.835,12 eŭroj, el kiuj la lernantaj instruistoj pagis 129.061,11 kiel kursoprezo. La regiona ministrejo de Kulturo kaj

¹¹ Fonto: Universitat de les Illes Balears.

Edukado subtenis la programon per 190.000 aldonitaj eŭroj. La subteno malkreskis post 2008, kiam ĝi atingis 350.000 eŭroj (por la tuta kosto de 595,888,33). Pro tio, la Universitato de la Balearaj Insuloj, kiel organizanta de la kursaro, jam ne plu organizas la instruon de la fakoj Lingvo I kaj Lingvo II, por kiuj ekzistas korespondo kun niveloj de la Eŭropa Referenckadro. La tuta buĝeto de la Ministrejo de Kulturo kaj Edukado de la Balearaj Insularo estas 822.106.223 eŭroj, do la oficiala subteno de la retrejnado de instruistoj estas 0,023% de la tuta kosto de Kulturo kaj Edukado de la insularo.

La altlernado en la insularo konsistas nun en la Universitat de les Illes Balears, kie ĉi tiu jaro studas 19.895 homoj. La decido pri la lingvoj de la instruado dependas de la instruisto, kiu devas publikigi ĝin en la programo de sia lernofako. Dum la jaro 2009-2010, 45.90% el la instruistoj instruis en la Kataluna kaj 48,41% en la Hispana¹². La datumo elvenas el enketoj al la studentoj, ne el la oficiala deklaro en la programoj¹³. La evoluo ŝajnas kontraŭi la disvastigadon de la Kataluna en altlernado:

	Kataluna	Hispana
1999-2000	50%	43,80%
2001-2002	47%	36%
2003-2004	57,63%	40,85%
2005-2006	50,56%	44,38%
2007-2008	51,67%	44,11%
2009-2010	45,90%	48,41%

Do, nur lastatempe la tendenco ŝanĝiĝis kaj la instruo per la Hispana superis la instruon per la Kataluna. Tamen, nur en la datumoj de la jaro 2009-2010 enmetiĝis la respondoj pli lingvuzado en la tri sidejo de la Universitat de les Illes Balears (Majorko, Minorko kaj Ejviso). Kalkulante nur laŭ la datumoj el la plejgranda sidejo, Majorko (95,61% el la studentoj de la tuta universitato), la Kataluna estas ankoraŭ la lingvo plej uzata, sed pli malpli sur la sama nivelo ol la Hispana:

2009-2010	Kataluna	Hispana
Majorko (19.022 studentoj)	47,64%	46,36%
Minorko (355 studentoj)	40,29%	55,40%

¹² Fonto: Universitat de les Illes Balears.

¹³ La respondoj estas arigataj laŭ departamentoj kaj ne estas kompensataj laŭ la kvanto de fakoj, studentoj aŭ studgrupoj.

Ejviso (518 studentoj)

26,35%

70,95%


Unu el la plej kompleksaj problemoj por la disvastigado de la Kataluna en altlernado estas la ricevadon de studentoj el aliaj regionoj kaj el aliaj landoj. Jam avertis pri tio Simó i Mesquida (2007), kaj precipe pri la malsufiĉo de rimedoj por la normigo de la Kataluna kompare kun la bezono de allogi fremdaj studentoj. Prave, kiel Simó i Mesquida diris, “multlingveco” estas vorto kiu ofte aperas en universitataj diskurso, sed ne realas: nur dulingveco kun iuj aperoj de la angla ĝis nun, kaj pli profunda ekde nun, okaze de la devo pruvi scipovon de la angla antaŭ ekhavi diplomon. Tamen, por kontraŭi la tendencon kiu finfine favoras la Hispanan, la universitato kreas rimedojn kiel lerniloj, kursoj, kompensoj por la instruistoj.

Unu el ĉi tiuj rimedoj estas bazaj lingvolerniloj (rete kaj papere) por alproksimigi la lingvon al la venontaj studentoj eĉ kiam ili ankoraŭ ne alvenis al la Balearaj. Tiuj ĉi lerniloj alvenas al la venontaj studentoj kune kun informoj pri lingvuzo kaj en socio kaj en universitato. Ankaŭ la universitato organizas lingvokursojn por studentoj kaj, ekde lasta jaro (2009-2010), ricevas subtenon el Eŭropa Unio por la organizo de intensajn kursojn de la Kataluna por studentoj de la programo Erasmus. Ĉi tiuj kursoj, dividitaj kun aliaj universitatoj el Katalunio kaj Valencilando, estas instruitaj antaŭ la komenco de la oficiala kurso kaj la vizitontaj studentoj ricevas rete la reklamon pri ĉi tiuj kursoj kiam ili estas elektataj, do kiam oni sciigas ilin pri la datoj de la oficiala kurso.


La universitato ankaŭ helpas la instruistojn traduki al la Kataluna iliajn tekstojn, projekciaĵojn, ktp. aŭ helpas ilin ĝustigi iliajn dokumentojn. La atingo de atestilojn pri iliaj scipovon de la Kataluna estas grava por la kalkulo de la salajraj komplementoj de la universitataj instruistoj. Ili povas plibonigi iliajn konojn de la Kataluna per aliĝi al specifaj kursoj senkostaj por ili.

Kiel videblas, la Kataluna estas lingvo de universitata instruo, kune kun la Hispana, en la Balearaj Insuloj, sed ĝi estas ankaŭ lingvo de scienco. Kiel ni scias, nuntempe la scienco parolas precipe la anglan. Tamen, ekzistas ankoraŭ spaco por aliaj lingvoj. Ekzemple, la doktoraj tezoj verkitaj en la Kataluna en la Universitat de les Illes Balears ekde 1997-1998 ĝis 2007-2008 estis 117, la tezoj en la Hispana estis 272, en la Angla 63, kaj en la Portugala 11, do la proporcioj videblas sube:

Lingvoj de tezoj 1997-2008



La tempa tendenco montras ke la barakto por la dua loko estas inter la Kataluna kaj la Angla:



La universitato subtenas la verkadon de studfinaj projektoj, magistrasaj tezoj kaj doktorasaj tezoj en la Kataluna. Studentoj kiuj verkas iliajn projektojn kaj tezojn en tiu ĉi lingvo ricevas 175 eŭrojn (projektoj kaj magistrasaj tezoj) aŭ 400 eŭrojn (doktorasaj tezoj).

La sciencajn verkojn de universitataj esploristoj kaj profesoroj ankaŭ inkluzivigas verkojn en la Kataluna. Pro tio, la universitato disponigas sekcion de terminologio por solvi dubojn pri scienca vortaro kaj proponi novajn vortojn. Ĉi tiu sekcio laboras kune kun TERMCAT (Terminologia Kataluna), la terminologia servo ligata al la Institut d'Estudis Catalans, la lingva akademio de la Kataluna.

KONKLUDOJ

La Kataluna estas viva lingvo de la Baleara Insularo sed suferas pro la malsimetriaj rilatoj kun la Hispana, ĉar la kono de la Hispana estas deviga en la tuta Hispanio kaj la malkono de la Kataluna ne estas baro por loĝi en la Baleara Insularo, malgraŭ kelkaj la devo de koni ĝin en la fino de la bazlernado kaj mezlernado aŭ por labori en la publika administracio.

La loĝantaro de la Baleara Insularo estas tre kompleksa ekde la komenco de la nuna jarcento. Ĉi tiu komplekseco videblas ankaŭ en la aro de lingvoj parolataj en la regiono. Ĉi tiu komplekseco kaj ankaŭ la elveno de la migrantoj tendencas al solvo per la uzado de la Hispana.

La regionaj leĝoj helpas konservi la Kataluna kiel utila lingvo, sed ĉi tiu celo postulas subteni diversajn agadojn kiel la lingva retrajnado de instruistoj, la instruado de la lingvo al ĵus envenintaj migrantoj, la plibonigo de salajroj de universitataj instruistoj, la helpservo por la sciencverkado en la Kataluna, le ekzamsistemo de lingvoniveletoj, ktp. Neniu el ĉi tiuj rimedoj bezonatas por la daŭro de la Hispana.

Malgraŭ kelkaj referencoj al la bono kaj utilo de multlingveco, la lingva diverseco de la insularo ne ŝajnas utili en la edukistemo.

Verŝajne la Balearaj Insularoj estas iu el la plej kompleksaj eŭropaj regionoj el la lingva vidpunkto, kie al la malekvilibra situacio inter du lingvoj aldonas alveno de lingvanoj el la tuta mondo. La Baleara kazo eblas montri ke ĉi tiuj kombinoj favoras la surmetitan lingvon eĉ kompare al klasika skemo de konflikto inter nur du lingvoj.

REFERENCOJ

ARACIL, L. V. (1983) *Dir la realitat*. Barcelona: Edicions Països Catalans.

CONSELL ESCOLAR DE LES ILLES BALEARS (2011) *Informe del sistema educatiu de les Illes Balears 2008/2009*. http://balearweb.net/ceib/informe_08_09/01_2008_2009.pdf.

DALMAU I GNER, D. (1936) *Poliglotisme passiu*. Argentona: Voliana, 2010.

DIRECCIÓ GENERAL DE POLÍTICA LINGÜÍSTICA (2011) *Desenvolupament del Marc Europeu Comú per Avaluar Nivells de Llengua Catalana*. Palma: CAIB.

HALL, J. (2001) *Convivència in Catalonia: Languages Living Together*. Barcelona: Fundació Jaume Bofill.

MELIÀ, J. & C. CANYELLES (2010) *Les llengües a les Balears. Anys 2008-2010*. Palma: Linguamón – Casa de les Llengües [ne eldonita].

SIMÓ I MESQUIDA, T. (2007) *L'ús de la llengua catalana a l'ensenyament superior als Països Catalans*. <http://www.vilaweb.cat/media/attach/vwedts/catalauniversitat.pdf>.

Spreading a lesser used language in a multilingual society


Abstract

This paper deals with the spreading of a minorized language in a multilingual society. I produce the case of Catalan in the Balearic Islands. 160 languages are spoken nowadays in these islands, where both Catalan and Spanish are official. Making Catalan worthwhile to immigrant workers and attesting their skills in this language is an asset both for the public teaching system and the whole of the Balearic society. Figures on language abilities and the legal frame on language teaching and usage are examined. Specifically this paper focuses on: a) the retraining of teachers who did not study Catalan in their basic training, b) the strategies for integrating migrant non Catalan speakers in the school system, c) the application of the new European language test system, and d) language policy at university level and scientific communication.


Catalan is spoken in the Balearic Islands since the 13th century. Since then until the mid-20th century, most of the population were monolingual in Catalan. Although since the 18th century Spanish has been the official language, this status did not affect everyday talk before the massive arrival of migrant workers due to the development of a tourism-based economy after 1960. Migrant workers arrived mostly from Spanish monolingual regions. They were not encountered by any reason to switch to Catalan because of the non legal status of Catalan and its absence from formal education until the end of the dictatorship, in force until the present Spanish constitution was approved (1978), after the dictator's death (1975). Being declared an autonomous region, the Balearic Islands got their own regional constitution in 1983, by which both Catalan and Spanish were declared official languages. Although competence in Catalan is not declared as compulsory (competence in Spanish is compulsory for all Spaniards following the Spanish constitution), competence in both languages is a requisite skill to graduate from basic school. According to the law, the autonomous government must guarantee general knowledge and usage of both languages. This is the basic point on which I would like to focus: studying Catalan is compulsory in the Balearic islands, and also in Catalonia and Valencia, but not in the rest of Spain. How to receive incoming students and also incoming teachers whose initial training concealed the language diversity of Spain has? This is one of the main problems to ensure continuity to a language sharing territory with one of the most widely spoken languages in the world. Until the beginning of the present century this problem just looked like the typical scheme of inequality between an imposed and a subdued language. Now a new factor in language relations is the evolution of society into a multilingual scenery, leading to the rising of a new role for the imposed language as a cohesive device for the new society. It is important to understand the structure of the population of the islands and, especially, their origins and their language skills. The following refers to languages declared as "own language" by interviewees in the last official survey (2010)¹⁵:

¹⁴ Nicolau Dols Salas, Professor Titular d'Universitat, Departament de Filologia Catalana i Lingüística General, Universitat de les Illes Balears, n.dols@uib.cat

¹⁵ Source: Institut Balear d'Estadística (<http://www.ibestat.cat>).



Several conclusions can be drawn: (1) historically, this is the first time that most of the population point at Spanish at their own language, and this occurs twenty five years after the passing of the act of Language Normalisation in the Balearic Islands; (2) only 6,19% of the population declare themselves as totally bilingual; (3) more than 10% point as a language different from Catalan or Spanish as their own language.



(Language skills in Catalan, average).

There exists no official data on skills in Spanish.

The origins of the population allows to understand these figures. Since 2001 the number of foreign inhabitants in the archipelago increased from 8,4% up to 21,9% (2010, Ibestat).

	Popula tion	Foreign rs	Average
2001	878627	73883	8,40
2002	916968	99744	10,87
2003	947361	126505	13,35
2004	955045	131423	13,76
2005	983131	156270	15,89
2006	1001062	167751	16,75
2007	1030650	190170	18,45
2008	1072844	223036	20,78
2009	1095426	237562	21,68
2010	1106049	242256	21,90


Adding to the number of foreign inhabitants the number of Spaniards born out of the islands, the final average of those born out of the Balearics is 46,51% of the total population. Some of these Spaniards grew up in Catalonia or Valencia (3,13% and 1,65% of the total population of the Balearics), and therefore Catalan is not unknown to them. The evolution of foreign immigration might be viewed as a balancing factor for the number of Spaniards migrating into the islands, especially for the acquisition of language skills: with no skills of any of the languages, the choice might be taken in more free grounds. In an opposed direction, Spaniards monolingual in Spanish do not feel the need for learning a new language, for theirs is already official in the region. However, the situation is a bit more complicated than that: at present, most of foreign migrants come from Spanish speaking countries and, therefore, they feel the same need as Spanish do for learning Catalan. Population of the Balearic Islands coming from Central and South America¹⁶ together with those coming from Equatorial Guinea raised to 89.960 in 2010, which stands for 37,13% of foreigners and 8,13% of the total population of the Balearics.

This figure is much higher than that about foreigners in Catalonia in 1996 pointed out by Hall 2001. However, Hall's remarks seem to be useful to explain the situation in the Balearics.¹⁷

¹⁶ not counting those coming from countries where Spanish is not official: Saint Vincent and the Grenadines, Jamaica, Surinam, Guyana, Saint Lucia, Trinidad and Tobago, Belize and Brasil (only cited migrant-sending countries to the Balearics since 2001 to 2010).

¹⁷ «The many new residents from Latin America, however, are swelling the already large Spanish-speaking community, and those of other origins are understably keen to learn, not Catalan, but Spanish, the language which is the basic requirement for interaction with the central government immigration authorities and with potential employers both inside and

Those who learn Catalan have already learnt Spanish. Therefore, learning Catalan is seen as a useless effort by those trying to accommodate to a new society. This state of affairs challenges a basic rule of relationship between Catalan-speakers and Spanish-speakers until the present time: the so-called “passive bilingualism”, or “passive multilingualism” (a firmly grounded concept in the recent history of Catalan and also in Esperanto¹⁸, defined as the adherence of every speaker’s to his/her own language during a conversation in which both parts understand each other).



The normalization of Catalan as a social language must overcome legal and social unbalances and make the language appealing to individuals who in fact do not need it because of such unbalanced situation. The interposition of Spanish assigns to Catalan the role of satellite language, in the sense of Eliot’s (1948) “satellite culture”, a concept transported by Aracil (1983) to sociolinguistics.

It is important to know the original languages of incoming migrants. This is a difficult task, for no official surveys exist on the matter. However, Linguamon – Casa de les llengües, a Catalan foundation for the study of languages all over the world, together with Universitat de les Illes Balears conducted last year a research project on this matter. Even not being wholly comprehensive, it focuses relevant trends on the linguistic complexity of the B. I. Incoming migrants of all nationalities were interviewed, in numbers proportional to the amount of their connaturals living in the islands. The number of languages existing in their countries was also taken into account¹⁹. Finally, 1.100 interviews were conducted. Both males and females of all different age groups, educational levels and of different migration time span were interviewed. Over 150 different languages appeared. The data are important because it is the first time that the sociolinguistic landscape of the islands is regarded with an insight deeper than the classic two languages model. Apart from these two official languages there exist nowadays in the Balearics twenty five languages spoken by more than 1.000 people (as first languages):

outside Catalonia» (38).

¹⁸ Dalmau (1936=2010).

¹⁹ 1 interview per 100 (or up to 100) migrants from every country (up to a maximum of 15 interviews) + 1 per every additional language spoken in the country by over 100.000 speakers + one per 10 additional languages spoken in the country by a number of speakers between 10.000 and 100.000.

SPEAKERS	LANGUAGE
> 20.000	German, English, Arabic
>10.000, <20.000	French, Galician, Romanian
> 5.000, <10.000	Italian, Bulgarian, Tamazight, Portuguese
> 1.000, <5.000	Polish, Dutch, Russian, Wolof, Mandarin, Quechua, Swedish, Guarani, Ukrainian, Wu, Igbo, Tagalog, Bambara, Punjabi, Slovak

In addition to Catalan and Spanish, sixty seven languages are the everyday communication system between parents and children. Therefore, and depending as well on the size of the linguistic community, sixty nine languages might persist as native languages in the Balearic society. How can this diversity be dealt with? Should it be supported? The point is not about the imposition of official languages; it should be better analysed on the grounds of language usage at school or in the relationship between government and citizens. Should teaching of their language at school be guaranteed to every language community? Should they be able to communicate with governmental offices in their own language? Ideally, yes. The more languages to be learnt and practiced, the better. Disseminating knowledge on language and culture diversity is no doubt a good aim for school and also for the whole of the society. However, managing this praiseworthy intention would be a difficult task. The language complexity of our present society is many times higher than the language complexity in Bjalistok during Zamenhof's school days.

The Balearic Council for Education has already seen the problem in their report on the academic year 2008-2009. They show their care for the continuity of education in Catalan after first school. They remind that according to the law, all schools in the Balearics must use Catalan at least in half the timetable or in a 50% of the subjects. It would be acceptable teaching all the time (except for the teaching of other languages) in Catalan, but not the reverse. The particular act on this matter was passed in the year 1997-1998, when the number of foreign learners was 2.956, and this figure increased up to 24.963 in a decade. For this reason the Council demands a "law which increases the presence and usage of Catalan at school [...]. The present law does not guarantee a sufficient knowledge of Catalan at the end of compulsory education"²⁰. The Council recommends the continuity of the language support system for incoming students. The autonomous ministry for education issued a decree on this matter in 2002. The explicit rationale of that order is a good insight in the sociolinguistic life of schools:

"The diversity of such students is great and depends on rather different elements: place of origin, reasons to migrate, socioeconomic factors, language and cultural factors... These circumstances creates new complexities for schools and teachers. Our schools are shared by

²⁰ "una nova legislació que augmenti la presència i l'ús del català en els centres educatius. Amb la normativa actual no es pot garantir que l'alumnat escolaritzat en els centres de les Illes Balears acabi l'escolarització obligatòria amb un coneixement suficient de la llengua catalana" (220).

migrant learners just entering the Balearic teaching system –or having entered the system short ago– with no knowledge of Catalan or Spanish, and also by Spanish speakers who does not know Catalan, arriving from other Spanish regions or other countries. The situation is even worse because of other factors like cultural differences between students depending on the degree of proximity between Balearic culture and that of their original countries. Academic differences must also be borne in mind (students with little learning experience, irregular learning records, together with students coming from educational systems comparable to ours)”).

The decree is a new instance of the principle on language management in the Balearic educational system: students cannot be segregated according to their languages. Until now, parents are not entitled to choose the languages in which their children are to be taught at school. According to the same principle, foreign students cannot be segregated from local, although special lectures can be arranged for new students, between six and sixteen hours per week. However, their belonging to a given reference class must be maintained. The segregation of students according to their home languages could be a countermeasure for social integration, and a real danger in a society like the Balearic. On the other hand, the legal text underlines the situation of Catalan and priority for this language in special actions for helping new students to cope with their new situation:

“the sociolinguistic situation of the Balearic Islands –the unbalanced use of Catalan– must be had in mind together with the fact that the most meaningful contact between those students and the official language of the Balearic Islands is the classroom. Therefore, [...] this language must be given priority when planning linguistic integration”.

In their report of year 2008-2009, the Balearic Council for Education already claimed a better financial support for this program. This claim evidences the challenge that the increase of migrant students implies for the Balearic educational system.

Language normalization is not only about school. It affects the whole of social relations. By law, authorities must address citizens in the language of their choice²¹, and so must do private companies with more than three employees²². Therefore, on the grounds of employability, learning Catalan is seen as a need by some newcomers. The region’s government offers low fee courses in Catalan. For the present session (2011), 3.005 people registered for Catalan courses: 2.335 of them are Spaniards, and 398 come from other Spanish-speaking countries.²³

Another important field of action is the retraining of teachers who graduated before the passing of the Act of Language Normalization or where trained out of the Catalan-speaking areas. The Diploma of Capability in Teaching Catalan and in Catalan in Preschool and Primary Education, or the Diploma of Capability in Teaching in Catalan in Secondary Education are requisites for teachers since 1986. Teachers who received their initial training in the Balearic Islands, Catalonia or Valencia after 1992 are considered to have enough training and do not need to achieve additional diplomas. The study plan for Preschool and Primary school teachers is as follows:

²¹ Decree 114/2008, 17th of October (on civil service), Act 5/2003, 4th of April (on language normalization in Health Service).

²² Act 11/2001, 15th of January.

²³ Source: Direcció General de Política Lingüística. Govern de les Illes Balears.

Subject	Hours
Catalan I (plus the passing of a test on basic skills in Catalan; otherwise, an additional subject of 60h)	60
Catalan II	60
Society and Nature in the Balearic Islands	15
Teaching Methods for Catalan	15
TOTAL	150 / 210

And the study plan for Secondary School teachers is as follows:

Subject	Hours
Catalan I (plus the passing of a test on basic skills in Catalan; otherwise, an additional subject of 60h)	60
Catalan II	60
Seminary on terminology	15
Seminary on language management in Secondary School	15
TOTAL	150 / 210

In the year 2009-2010, 2.109 teachers registered for the courses. The evolution of the registrations can be observed here²⁴:

01-02	02-03	03-04	04-05	05-06	06-07	07-08	08-09	09-10
2.833	2.886	3.337	3.206	2.845	2.563	3.324	3.566	2.109

The cost of this system is high. It reached 321.835,12 euros last year. Less than half of this cost (129.061,11 euros) was supported by course fees. The region's Ministry for Culture and

²⁴ Source: Universitat de les Illes Balears.

Education granted 190.000 additional euros. The government's financial support decreased after 2008 (350.000 euros for a total cost of 595.888,33). For this reason, the University of the Balearic Islands, responsible for the organization of the courses, gave up scheduling the subjects Catalan I and Catalan II, for which a correspondence exists with levels of the European Language Test System. The whole annual budget of the regional Ministry for Culture and Education is 822.106.123 euros. 0,023% is the official contribution to language retraining for teachers.

The only university in the islands is the Universitat de les Illes Balears, with 19.895 students (2011). Every lecturer is entitled to decide the language of his/her lectures, and this decision must be announced on the module's description. In the academic year 2009-2010, 45,90% of the university subjects were taught in Catalan and 48,41% in Spanish²⁵. These data are taken from a general inquiry on students, not from official statements on programs²⁶. The evolution of language usage in university education seems to favour Spanish:

	Catalan	Spanish
1999-2000	50%	43,80%
2001-2002	47%	36%
2003-2004	57,63%	40,85%
2005-2006	50,56%	44,38%
2007-2008	51,67%	44,11%
2009-2010	45,90%	48,41%

It should be born in mind that only data for the year 2009-2010 were obtained in the three islands where UIB offers education (Majorca, Minorca and Eivissa). Taking the data only from Majorca (as for the years 1999-2008), where 95,61% of the students concentrate, Catalan is still first by a slight difference over Spanish:

2009-2010	Catalan	Spanish
Majorca (19.022 students)	47,64%	46,36%
Minorca (355 students)	40,29%	55,40%
Eivissa (518 students)	26,35%	70,95%

²⁵ Source: Universitat de les Illes Balears.


²⁶ Answers organised according to departments independently of number of subjects, students or groups.

One of the most important problems for the spreading of Catalan in university is the student flow through different regions and countries during their learning time span. Simó i Mesquida (2007) warns about the lack of measures to preserve Catalan as a language of university education in counteraction of the need for attracting foreign studies. According to Simó i Mesquida “multilingualism” often appears in university discussions, but it seldom reflects in everyday life, based on bilingualism with certain contributions of English. The role of English is to be widened as it has become requisite in all new university undergraduate courses after 2009. In order to help counteracting trends, the university offers language resources like self study books and websites, special language courses for newcomers or salary complements for lecturers achieving certain qualifications in Catalan, Spanish and English.


One of these self-study resources is a basic method (website and book) intending to introduce Catalan to future students from overseas before they arrive to the Balearics. This method reaches the student at home together with information on language usage in university and in the rest of society. The university organizes Catalan courses for students and, since 2009-2010 intensive courses in Catalan are offered every summer with the support of European Union. These courses are shared with other Catalan-speaking universities and the information about them is circulated to prospective students.

Then university offers help to lecturers in the translation to Catalan (or improvement when originally in Catalan) of their texts, presentations, etc. Proving their language skills in Catalan by passing tests allows them to improve their salaries. Special free courses for lecturers are provided.

Together with Spanish, Catalan is a teaching language at university, and it is also a science language. As we know, nowadays science normally speaks English. However, it seems that there is still some room left for other languages. As an example, the languages in which PhD thesis are produced: between 1997-1998 and 2007-2008 272 were written in Spanish, 117 in Catalan, 63 in English, and 11 in Portuguese, thus the following averages result



The time graphic shows the struggle for the second place between Catalan and English



A university program gives support to the production of course final projects, and masters and PhD thesis in Catalan. Students writing their projects or thesis in this language receive 175€ (projects and masters thesis) or 400€ (PhD).

Scientific writing by university researchers and lecturers is in part produced in Catalan. Doubts on scientific terminology are solved by a special university department in cooperation with a central terminology service linked to the Institut d'Estudis Catalans, the academy of Catalan language.

CONCLUDING REMARKS

Catalan is alive and dynamic in the Balearic Islands, but it suffers from an asymmetrical relation with Spanish. This is due to the fact that Spanish is the compulsory language everywhere, and everyday life is possible without knowing Catalan, except for primary and secondary education or for civil service.

The population of the Balearics shows a high degree of complexity since the beginning of the present century. This complexity can be observed also in the languages spoken in the area. This complexity as well as the adaptation of migrants to their new society, tends to favour Spanish.

The regional law supports the preservation of Catalan as a useful language, and therefore the government endeavour to support several actions like the retraining of teachers, the teaching of the language to newcomers, the incentives for university lecturers to improve their knowledge of Catalan, the terminological consult service for researchers, the language test system, etc. None of these resources seems to be needed in order to preserve the vitality of Spanish.

Despite certain explicit references to multilingualism, language diversity is not an interest of the educational system.

The Balearic Islands are possibly one of the most linguistically complex regions of Europe, because of a recent massive arrival of migrant from all around the world, added to a previously existing asymmetric relation between two languages. The case of the Balearics shows how this combination favours the imposed language even when compared to the classic model of a two languages conflict.

REFERENCES

ARACIL, L. V. (1983) *Dir la realitat*. Barcelona: Edicions Països Catalans.

CONSELL ESCOLAR DE LES ILLES BALEARS (2011) *Informe del sistema educatiu de les Illes Balears 2008/2009*.
http://balearweb.net/ceib/informe_08_09/01_2008_2009.pdf.

DALMAU I GENER, D. (1936) *Poliglòtisme passiu*. Argentona: Voliana, 2010.

DIRECCIÓ GENERAL DE POLÍTICA LINGÜÍSTICA (2011) *Desenvolupament del Marc Europeu Comú per Avaluar Nivells de Llengua Catalana*. Palma: CAIB.

HALL, J. (2001) *Convivència in Catalonia: Languages Living Together*. Barcelona: Fundació Jaume Bofill.

MELIÀ, J. & C. CANYELLES (2010) *Les llengües a les Balears. Anys 2008-2010*. Palma: Linguamón – Casa de les Llengües [ne eldonita].

SIMÓ I MESQUIDA, T. (2007) *L'ús de la llengua catalana a l'ensenyament superior als Països Catalans*. <http://www.vilaweb.cat/media/attach/vwedts/catalauniversitat.pdf>.